

ĈEĤOSLOVAKA
ESPERANTO
REVUO

JARO XIII. NRO 6.

30. SEPTEMBRO 1931.

LA PROGRESO



OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.--; fremdlando Kĉ 25.-- (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ŝparkaso Praha: N-ro 34.271

KRAKOVA KONGRESO.

Nia 23a universala kongreso okazinta la 1—8. Aŭgusto 1931 en Kraków ne kunvenigis tro grandan nombron da kongresanoj. Aliĝis neplenaj ok cent, sed el tiuj preskaŭ ĉiuj ĉeestis. Kialoj de malgranda nombro estas diversaj. Certe krom ĝenerala ekonomia krizo, kaj senlaboreco en Granda Britujo, aktuala financa krizo en Germanujo kaj alilande, efikis ankaŭ la malgranda reklamo de la loka kongresa komitato. Certe ankaŭ ne tro alloga efikis la hotelaj prezoj indikitaj en la varbiloj. Veninte en la hotelon la kongresano spertis, ke la loka komitato enkasigis por la hotelĉambro pli ol oni estus paginta en la hotelo senpere kun ĉiuj alpaĝoj impostaj kaj trinkmonaj. Pri tiu servo aŭdiĝis do diversaj kritikoj.

La urbo mem estis tre bona kadro de la kongreso. La Krakovaj esp-istoj sukcesis vekti gravan intereson en la urbo. Urbestro nomigis unu straton laŭ Zamenhof kaj inaŭguris ĝin dum la kongreso. La plej granda pola ĵurnalo Ilustrowany kuryer codzienny ĉiutage raportis detale pri la kongresaj aferoj esperant- kaj pollingve. En centro de la urbo preskaŭ sur ĉiu restoracio kaj butikoj flirtis esp-a flageto kaj multaj afiŝetoj en la fenestroj asertis, ke „Oni parolas esperante“; kaj efektive ofte kelnero kaj vendistoj sciis respondi kaj priservi nin esperant-lingve. Precipe rimarkinda estis situacio en la plej granda el unuarangaj restoracioj Krakovaj Hawel-

ka, kie 10 kelnero, absolventoj de la antaŭkongresa kurso, parolis nian lingvon; oni ankaŭ trovis tie ĉiam pli da esperantlingvaj manĝokartoj ol da pollingvaj. Laŭdon meritas gvidlibroj tra Kraków kaj tra Pollando, kiujn ĉiu kongresano ricevis. Ankaŭ laŭ aliaj teknikaj vidmanieroj la kongreso estis bone preparita. La kongreso estis en Supera komerc-ekonomia lernejo, kies klasejoj estis adaptitaj por akceptejoj, poŝtejoj, vendejoj kaj uzataj por fakaj kaj estraraj kunvenoj. Laŭdan mension meritas ankaŭ la kongreseja bufedo kun efektive malaltaj prezoj. Malferma kaj laboraj kunvenoj estis en bela halo de Katolika domo, pli grandaj kunvenoj en salono de Industria muzeo, Somera universitato. Amuzaj aranĝoj vesperaj krom la kutima balo estis muzikaj kaj kantaj koncertoj, al kiuj estis invitata kaj venis ankaŭ la eksterkongresa publiko; ili sukcese celis montri altan nivelon de la polaj muzikaj artistoj. Esperant-lingvaj numeroj estis neoftaj en ilia programo. Tute alia estis la literatura matineo de Literatura Mondo, kies esperant-lingva programo havis en pluraj numeroj altan nivelon laŭ tekstoj same kiel laŭ aktorantoj. Sajnas al mi, ke la esp-istaj kongresoj estas la plej taŭga okazo por aŭdiĝi nian lingvon el buŝo de bonaj deklamantoj kaj kantantoj. Ĝi multe pli utilis por unuformigo kaj plibeligo de prononcado ol la teoriaj diskutadoj. Tial mi tre bedaŭris, ke teatro estis forlasita.

La agado de la kongreso mem mont-

KRIZANTEMOJ.

Rusa kanto.

Mi baldaŭ certe mortos nun,
ĉar min forlasis mia sun'
pro via amo malfidela,
mi restis sola en la mond',
fariĝis nigra horizont',
jam ĉesis tempo la plej bela.

Perfidon vian spertis mi
kaj en duona agoni'
nur morton por vi mi deziris;
mi certe enterigus vin,
ho malfidela amatin',
sed venkon granda am' akiris.

Alproksimiĝas lasta tag',
atendas min eterna plag',
de'l morto vidas mi emblemojn;
pardonu, kara amatin',
ho, preĝu mia por anim',
sur tombon donu krizantemojn.

Tr.: Dr. Jos. Fousek.

ris rimarkindan intereson pri metodoj kaj rezultatoj de nia laboro. La raportoj kaj diskutoj en kunvenoj de Konstanta Re prezentantaro, de UEA-komitato, de Ĝenerala estraro certe estos utiligatajen organizo de nacia propagando por konformigi ĝin al ĝenerale interkonsentitaj tendencoj de nia movado.

Ankaŭ la laborkunsidoj kunvenigadis rimarkindan nombron de kongresanoj. Detalaj raportoj oficialaj de Int. Centra Komitato, Konstanta Re prezentantaro, UEA, Lingva Komitato estis laŭkutime senditaj al ĉiuj kongresanoj presite, en la kunsidoj la raportantoj povis sole atentigi pri gravajoj kaj respondi demandojn. La raporto de UEA estis prezentita en aparta UEA-kunveno, kion mi ne trovas ĝusta; laŭ la Helsinkia kontrakto UEA estas oficiala parto de la internacia movado, ĝia raporto apartenas en oficialan laborkunsidon de la kongreso.

Krom la oficialajn raportojn oni enmetis en la programon de la laborkunsidoj prelegojn pri aktualaj espistaj problemoj: Propagando per filmo (J. Forge-Fethke), Centriĝo de la

gazetara informado pri esp-o (Teo Jung), Vojoj kaj metodoj de apliko de esp-o por turisma reklamo (Karsch), Elparolado (Warden), Esp-o kaj stenografio (Höke), Kiel propagandi efike (Kreuz) kaj aliaj. Kelkaj el tiuj prelegoj estis tre instruaj, kelkaj multe malpli.

Kiel mi jam estas dirinta, la atento kaj diskutmaniero de la kongresanoj donis novan konfidon en regulan disvolvodon de nia movado eĉ al skeptika humoro. Sola malplaĉa impresoj por mi estis artifikajoj, per kiuj kelkaj amikoj de s-ro pastro Cseh daŭre provokadis ovaciojn por sia majstro. Precipe proponon (neakceptitan) de s-ro Morariu elekti kontraŭregule Cseh, Jung, Baghy honoraj vicprezidantoj de la kongreso mi trovis neaprobinda.

Kaj ni finu per rememorigo pri la Malferma kunveno, kiu denove efikas potence je niaj sentokapabloj. De komencaj malfermaj vortoj ĝis fina kantado de la himno ni spertis novan manifestiĝon de solidareco de ĉiuj samideanoj por la komuna celo. Profesoro Bujwid estis digna prezidanto, Merchant sperta oratoro. Plej altaj reprezentantoj de la urbo oficiale salutis la kongreson (Vojevodo, vicurbestro, universitata rektoro.)

Nia lando estis dece reprezentita. Ni estis pli ol kvindek el Ĉeĥoslovakio. Prezidanto de nia CAE estis elektita vicprezidanto de la kongreso, vicprezidanto de CAE salutis la kongreson en nomo de nia Asocio. Ili ankaŭ reprezentis nin en kunsidoj de K. R. kaj de Ĝenerala estraro. Dro Pitlík prelegis en Somera universitato pri „Metodoj de sukcesa turisma informado kaj gvidado al eksterlandanoj“. En UEA-kunveno estis solene proklamita elekto de s-ro Kudela honora membro pro multjara fidela servado. S-roj Neuzil kaj Krysta partoprenis antaŭkongresan Cseh-kurson kaj seminario, S-ro Neuzil raportis en TAGE-kunveno pri sia instrua metodo. Dro Kamaryt traktis kiel delegito de Slovaka porfremdula asocio kun Krakovaj korporacioj pri privilegio de turistaj rilatoj inter la najbaraj regionoj.

Dr. Stan. Kamaryt.

La homaro vivas unu minuton. Ni reduktu la tutan daŭron de la ekzisto de la Vivo sur nia terĝloto je 24 horoj. Ni imagu, ke ne pli frue ol hieraŭ tagmeze aperis sur la Tero la unuaj, la plej simplaj komencoj de la vivo generale. Juĝante relative, laŭ la geologia kaj la paleontologia evoluo de la tero, ni povas diri, ke nur ĉirkaŭ la 20-a horo vespere komencis ekzisti la primitivaj senvertebraj maranimaloj kaj nur matene ĉirkaŭ la 4-a horo — en la primara epoko 1) — aperas trilobitoj (ekz. en skistoj 4) de Bohemio, vidu trovojn de Barrande apud Chuchle. La epoko sekundara, 2) la tempo de grandaj saŭroj, palmoj ktp., kiu en la nuna segmento de la tempo reprezentas sole trihoran evoluon, okazas ĉirkaŭ la 9-a horo matene; la epoko terciara 3) — unu horo — okazas nur post la 11-a horo kaj fine la krono de la kreitaro, la homo aperas sur la tero je la 11-a horo 59 minutoj. Kiel mallongega estas la ekzisto de la homaro kompare kun la tuta vivo, kiel mallonga nia historio apud la tuta evoluo de la homaro, kaj kiom malmulte signifas individuo en la tuta ĝisnuna evoluo, nesuperrigardebla kaj senfina. Kaj kia estos nia plua historio, la plua vojo de la homaro?

Imago pri la eterneco. Henrik van Loon rakontas la jenan parabolon: „Supre en la nordo, en regiono Svithjord, staras roko. Ĝi estas 100 mejlojn alta kaj 100 mejlojn longa. Ĉiam unufoje dum 1000 jaroj alflugas birdeto, ekzistas sur la roko kaj ekfrotas ĝin per la beketo. Kiam per tiu maniero la roko estos plene forfrotita, forpasos unu tago de la eterneco“. Tia unu tago eble eĉ ĝis nun ne forpasis; kiom da ili nia homa gento ankoraŭ travivos?

Literatura lingvo por nomadoj. Profesoro de la Leningrada universitato, rusa sciencisto Tanboĝoras, kunmetis alfabeton por vico da nomadaj gentoj vivantaj sur la norda bordo de la eŭropa kaj azia Sovetio. La gentoj ĝis nun staras sur la plej malalta grado de la civilizo, vivas nomadan vivon okupante sin plejparte per ĉasado kaj fiŝkaptado. Literaturan lingvon ili ĝis nun ne havas; ĝi nun devas esti reguligita por ili kun uzo de signoj de la rusa alfabeto. La registaro venigis el ili kaj el la gentoj de la orienta Rusujo pli grandan nombron da junuloj, kiuj estos klerigataj en Leningrad; poste ili revenos en siajn patroregionojn por tie labori kiel unuaj pioniroj de la kulturo. (R. C.)

Dr V. V. Stech estas, kiel oni scias, vivanta enciklopedio kaj, se vi volas, eĉ vivanta al-

bumo de eminentuloj. Demandu lin pri kiu ajn, kiu ion signifas en la mondo, Stech iom pensiga kaj tuj „kvazaŭ li tion ŝutus el la maniko“. Foje li sidas en societo de artistoj kaj lia apudsidanto diras: „Kiu estas la sinjoro tie, jen?“ — Profesoro Stech esploras la misteran individuon kaj deklaras solene: „Li estas Neniu. Se li estus Iu, mi ja konus lin.“

Kandidato-deputito kaj stenografo. Lordo Roseberg parolis en kunveno de elektantoj. Partoprenis ankaŭ multe da liaj kontraŭuloj, kiuj lin senĉese interrompdis per sia kriado. Sed je la malvarmosanga lordo ĝi ne efikis kaj fine li diris kun malica rideto al la bruanta homamaso, kiam ĝi iom silentiĝis: „Iru afable hejmen kun via krio! Per helpo de ĉi tiuj kraĵonoj — kaj li sin turnis al la ĵurnalistoj stenografantaj liajn dirojn — mi parolas al kvardek milionoj da homoj!“

Hieraŭ mi renkontis vian edzon, sed li ne vidis min. — Mi scias. Li rakontis tion al mi.

Vojaĝanto al hotelservisto: Ĉu en via hotelo oni parolas ankaŭ fremdajn lingvojn? — Jes! — Kiu do? — La eksterlandanoj.

V kurseh, které chystáte, použijte... Svým známým k domácímu učení doporučujte....

UČEBNÍCI A CVIČEBNÍCI
MEZINÁRODNÍHO JAZYKA

ESPERANTO

OD PROF. DRA ANT. ŠILHY

96 stran. — Cena Kč 10.60 s portem.
Při odběru aspoň 5 výtisků sleva.

Vydalo La Progreso, Praha VII.

S-ro SCHERER KAJ LUPE VELEZ
FILM-AKTORINO.



PRI S-ro SCHERER.

S-ro Jos. R. Scherer vizitos en novembro nian landon. Multaj el niaj samideanoj vidos kaj aŭdos lin kaj povos paroli kun li. Lia persono vekas intereson de la esperantistaro jam de unu jaro kaj ni esperas, ke la jenaj informoj pri li kaj lia vojaĝo respondos la multajn demandojn direktitajn kaj direktotajn pri li.

S-ro Scherer estas estro de unu fako en la granda Seaboard National Bank en Los Angeles, kaj krom tio li laboras kiel ĵurnalisto. Li ricevis rekomendojn de diversaj institucioj amerikaj (Komerca Ĉambro de Los Angeles, American Banking Association, k. a.). Okaze de sia vojaĝo li estis nomita speciala delegito de Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado.

S-ro Scherer vojaĝis jam tra la jenaj landoj: el Kalifornio tra Havaj-insuloj, Japanio, Ĉinio, Indoĉinio, Siam, Java, Indio (ĝis Himalajo), Cejlono, Egipto, Palestino, Sirio, Turkio, Greklando, Italio, Svislando, Pollando, Litovio, Latio, Estonio, Finnlando, Svedlando, Norvegio (ĝis la polusa cirklo), Danlando, Germanio. Tra Aŝ li venos al nia lando, kie li finos sian vojaĝon en Bratislava. De tie oni atendas lin

en Aŭstrio, Hungario, Rumanio, Bulgario, Jugoslavio, Albanio, Francio kaj Iberia duoninsulo.

Interesaj ciferoj pri lia vojaĝo:

De la 5 Septembro 1930 ĝis 31. Julio 1931 S-ro Scherer havis

91 publikajn paroladojn

10 radio-paroladojn.

En tiu tempo li vojaĝis kaj parolis en

18 landoj de Azio kaj Afriko kaj

4 landoj de Eŭropo.

S-ro Scherer haltis dum sia vojaĝo en 94 urboj kaj lokoj.

Li uzis 22 diversajn ŝipojn, sur kiuj li pasigis 64 noktojn. En vaĝonaro li pasigis 50 tagojn aŭ noktojn, restante survoje de la 5. Sept. 1930 ĝis 31. Julio 1931 tio estas 265 tagojn.

Pri lia vojaĝo raportis 400 gazetoj de ĉiuj landoj de li vizititaj.

Ni ne dubas, ke la esperantistaro en Ĉeĥoslovakio kun ĝojo akceptos s-ron Scherer kaj klopodos, ke li forportu el nia lando la plej bonan impreson.

Hm

BULTENO

DE ĈEHOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA VII. SOCHAŘSKÁ 333.
NUMERO 38. - SEPTEMBRO 1931.

IV. KOMITATA KUNVENO DE CAE

okazis jaŭde la 17. Septembro 1931 en Praha, kafejo Louvre, Ĉeestis ges-oj Ginz, Herzigová, Hromada, Janda, Dr. Pitlík, Slavík, Sustr kaj Tarantíková. Senkulpigis sin S-oj Staněk kaj Votrubec. Leterojn por la kunveno sendis Dro Kamaryt, S-oj Sklenčka kaj Kudela. La kunveno — la unua post la libertempo — daŭris de la 20.30 ĝis la 24 horo. Prezidis D-ro Pitlík, protokolis F-ino Tarantíková. Pri la traktado ni publikigas la jenan koncizan raporton.

Propaganda semajno.

Laŭ la interkonsento kun GEL, farita dum Esperanto-taĝo en Pardubice (la 27. 6.), kaj laŭ la oftaj deziroj de la kluboj, ni rekomendis aranĝi Esperanto-semajnon de 1.—8. Oktobro 1931 Ĉirkuleroj senditaj al niaj kluboj enhavas diversajn konsilojn pri tio. La propagandiloj Pojtko estas mendeblaj ĉe nia kasisto (Otto Sklenčka, Hradec Králové, Masarykovo nám., 628a), 1000 ekz. 50 Kč, 100 ekz. 7 Kč. Tien ankaŭ skribu pri la senpaga kvanto, kiun certaj kluboj rajtas ricevi laŭ nia printempa ĉirkulero.

Propagando per publikaj legejoj.

Al la publikaj legejoj de 50 pli grandaj urboj kaj lokoj, en kiuj ni ne havas movadon, ni sendados Progreson 1931 senpage, se la estraro de la legejo garantias korektan elpendigadon. En la n-rojn estos enmetataj propagandiloj. Ni esperas, ke apud la propagando per tiulokaj gazetoj, la aranĝo helpas, ke nia movado penetru en novajn lokojn. Por tiu ĉi propagando ĈAE ricevos la gazeton kun 50% rabato.

V. Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso en Olomouc, 1932.

Demandita de nia prezidanto, la Esperantista Societo en Olomouc, laŭ la letero subskribita de S-ro Kudela, estas preta aranĝi en sia urbo la kvinan kongreson de ĉeĥoslovakaj esperantistoj dum Pentekosto 1932 (la 15. — 16. Majo). Prezidanto de GEL informis nin buŝe, ke GEL konsentas pri la aranĝo. ĈAE same kiel GEL disponiĝos al E. S. Olomouc po 500 Kč por la preparaj laboroj. ĈAE pruntos materialon por propaganda ekspozicio kaj donos senpage propagandan materialon. Decidite ankaŭ men-

di flagojn kaj standardojn sunreziste verdajn. Pri la fervoja rabato ni zorgos. Distraĵoj okazos sole en esperanto. Pri la financa aranĝo la traktado estas daŭrigata, same pri la definitiva programo.

Scherer venos al ni en novembro.

Ĉar la alvoko publikigita en la Progreso ne sekvigis la petitan rapidan anoncon de la kluboj dezirantaj inviti sron Scherer, ni dissendis ĉirkuleron al ĉiuj kluboj montrintaj iam sian intereson kaj informis ilin pri la taĝo, en kiu sro Scherer venos en ilian lokon. Post interkorespondado kun ICK kaj la kluboj, ni povis ĝis nun fiksi la viziton de sro Scherer jene:

- 4., 5., 6. XI. Praha
7. XI. Kladno
8. XI. Plzeň
9. XI. Mladá Boleslav
10. XI. Mnichovo Hradiště
11. XI. Hradec Králové
14. XI. Brno
15. XI. Prostějov
- 16., 17. XI. Olomouc
18. XI. Mor. Ostrava
19. XI. Český Těšín.

La paroladojn en Mor, Ostrava kaj Český Těšín ni envicigis laŭ peto de GEL, kiu zorgas pri aranĝo en tiuj du lokoj. La 12an kaj 13an de novembro ni rezervis laŭ peto de ICK por Breslaŭ. Se la du taĝoj liberiĝos, pri kio ni petis ICK, ni aldonos la 12an al Hradec Králové kaj 13an al Brno. Ambaŭ lokoj petis pri tio.

Post ricevo de novaj informoj de ICK, ni donos definitivan sciigon al Košice kaj Bratislava. Se sro Scherer partoprenos laŭ nia invito dutaĝan ekskurson al la montaro Tatry, li estos la

22. X. en Košice
25. XI. en Bratislava.

Se tiu ekskurso ne okazos, sro Scherer alvenos al ambaŭ lokoj je du taĝoj pli frue.

Kun sro inĝ. Scholze, prezidanto de GEL, estis preparolitaj diversaj detaloj kaj interkonsentita egale procedo. Novajn informojn ricevos la kluboj per ĉirkulero aperonta tuj post veno de respondo el Genevo. La kluboj bv. korespondi pri afero Scherer rekte kun sro

O. Ginz, Praha II., Stárkova 4.

Montriĝis neeble eldoni komunan afiŝon pri Scherer-paroladoj, laŭ propono de Bratislava klubo.

Stacidomaj tabuloj.

Ni traktas kun GEL pri utiligo de la ministeria permeso fiksi unuformajn informajn tabulojn pri esperantaj kluboj kaj funkciuloj en ĉiuj stacidomoj en Ĉeĥoslovakio. Estis petitaj ofertoj por tiaj tabuloj.

Gvidfolio Praha.

Post venko de multaj malfacilaĵoj estis eldonita flugfolio de Praha, por kiu destinis en la jaro 1929 la Postkongresa komitato en Praha 2000 Kč deponitajn ĉe ĈAE. La tekston verkis afable S-o H. K. Bouška. La luksa flugfolio presita de unuaranga presejo povis aperi en 2000 ekzempleroj. Fakturo de 6a de aŭgusto sumanta Kč 2369.45 estis pagita kaj estas nun aprobita. ĈAE pagas la nekovritan reston de Kč 369.45 el sia kaso. Por la kongreso en Krakovo estis senditaj aerpoŝte 500 pecoj, sed laŭ informoj ricevataj ili ne alvenis. Ĵusa letero de aerpoŝta kompanio sciigas, ke la sendaĵojn la pola doganejo transdonis nur la 10an de aŭgusto, do jam post la kongreso. Ni petas nun resendon. UEA deklaris sin preta sendi la gvidfoliojn al siaj delegitoj. Ni sendis al ĝi provizore 450 ekzemplerojn, al ICK laŭ ĝia peto 200 ekz. Al 25 esperantaj gazetoj ni forsendis recenzajn ekzemplerojn kun informo, ke ni sendas la gvidfolion senpage al ĉiu petinto ekster Ĉeĥoslovakio. Ni donis kvanton da ili je dispono de EK Praha, sendis kelkajn al Internacia Libertepejo en Lázně Bělohrad kaj disdonis ilin al fremduloj vizitintaj Praha. Ni sendos ankoraŭ al la ministerioj, urbo Praha kaj a. por ni gravaj lokoj. — Estis decidite pagi honorarion 150 Kč al la aŭtoro.

Kursoj Cseh-metodaj

S-ro Cseh informis nin, ke li ne povos veni al CSR en tiu ĉi sezono. Tio malebligis al ni fari entreprenojn propagandajn, por kiuj la ĉeesto de S-ro Cseh mem estas necesa, kiel montris la detala studo de la afero en la lastaj monatoj. La komitato decidis lasi al unuopaj kluboj la ripenson, ĉu ili invitu ĝes-ojn Morariu. Sinjoro Morariu estis en Praha la 13. 9., sed bedaŭrinde neniu komitatano de ĈAE havis eblecon preparoli kun li la aferon.

Membroj.

— Laŭ informo de nia kasisto S-ro Skleněka por la nuna jaro pagis ĝis 15. Septembro 288

membroj (en tio 13 membroj de Studenta sekcio). Krom tio en la nuna jaro estis pagitaj 83 kotizoj por diversaj jaroj 1920—1930. Por 1930 estis pagitaj ĝis nun 225 kotizoj, kresko en la nuna jaro estas do 63 membroj. Nia kasisto ne estas kontenta pri la rezulto. Novaj admoniloj estos dissendataj. Sparu al ni tempon pli utile uzeblan kaj sendu vian kotizon por 1931 (per blankopagilo de Poŝta Sparkaso en Praha, Nro 9.602.)

Verko de dir. Bartoň.

La em. direktoro de burĝaj lernejoj S-ro Bartoň, nun en Praha, verkis libron (100 p.) pri morala eduko en la lernejo (Mravní výchova ve škole), eldonitan en 1921. Ing. Kroužil ĝin tradukis en espo. Dir. B. petas nin mem eldoni aŭ rekomendi eldonon. Ni transdonos al eksterlanda fakulo.

Krakova kongreso

Dro Pitlík raportis pri la kongreso, precipe pri la kunvenoj de la Ĝenerala Estraro.

Financa administrato.

Por faciligi al nia kasisto la rilaton kun la Poŝta Sparkaso, la kunveno aprobis ke ankaŭ li havu rajton subskribi la ĉekojn.

Por Rotaria kongreso

en Wien, somero 1931, ni sendis, laŭ atentigo de ICK, 80 ŝlosilojn ĉefajn de Ĉefeĉ. La prezentita fakturo de la Ĉs. E.-Instituto je 48 Kč estos pagita.

Multobluga aparato.

Decidite ne postuli de E. Klubo Praha pagon por uzo de nia aparato (multoblugo de 160 klubaj cirkuleroj).

Presajoj.

Danke akceptita la raporto de S-ro Sustr pri la provizo de asociaj presajoj deponitaj en klubaj ŝrankoj. Decidite pri tio, kion ni daŭre konservos.

Propagando per gazetaro.

En la kongresa raporto de Int. Gazetara Komisiono, prezidata de s-ro Avril, mankas informoj pri nia laboro kaj ĝiaj rezultoj, kvankam nia prezidanto informis s-ron Avril jam en majo. Ni petis kompletigon en definitiva teksto aperonta en Kongresa protokolaro. — S-ro Avril promesis tion fari, klariginte, ke nian leteron li ne ricevis.

Radio-parolado

en Brno okazos. Detaloj mankas.

Bulgara karavano.

CAE sukcese intervenis ke la karavano de bulgaraj samideanoj partoprenintaj la kongreson en Krakovo ricevu 33% rabaton por revojaĝo Praha-Velenice.

Rabato por kongresanoj el ĈSR.

Kune kun la Ligo de katolikaj esp-istoj ni subskribis peton al la fervoja ministerio pri rabato. La 33% rabato estis konsentita.

Estraroj de CAE kaj GEL kunvenis

en Pardubice sabate la 27. 6. en speciala ĉambro de řemeslnicko-živnostenská Beseda. Ĉeestis prez. de CAE D-ro Kamaryt, ĝen. sekr. Hromada, kasisto Sklenčka, plie S-inoj Herzigová kaj Tarantíková, S-ro Kudela, Heikenwälder, Sustr, por GEL ĝia prezidanto Ing. Scholze kaj F-ino Kristen. Priparolitaj estis serio da propagandaj entreprenoj (semajno, Cseh-kursoj), espo en lerneja reformo k. a.

Labora kunsido en Pardubice

okazis dimanĉe je 8.30 horo. Post longa tempo (se ni ne kalkulas la jarkunvenon de CAE) ĝi estis ree okazo por kunveni kun multaj samideanoj laborantaj en diversaj lokoj de la respubliko. La kunveno povis komenci precize, ĉar je la dirita horo la salono estis jam pleneĝa. La komitato sekvas nun la diversajn opiniojn kaj konsilojn diritajn tie.

Esperanto-Taĝo en Pardubice

Ĝi okazis la 27. kaj 28. 6. 1931 kaj bone sukcesis. Pri la laboraj kunsidoj ni skribas supre. La amuza vespero sabata agrabla (nur iom malmulte da esperanta programo). Manifesto en la ekspozicia Rotundo estis partoprenata de oficaluloj ekspoziciaj kaj urbaj. Poste estis vizitita tombo de Dro Schulhof, pioniro de espo en orienta Bohemio kaj rekonata poeto esp-a. Bedaŭrinde la vizitanto estis nekontentige nombra (60 personoj, invitiloj kelkaj centoj). Plej multe da ĉeestantoj estis el Praha. La komitato dankas al la Pardubicanoj, precipe al F-ino Michalová kaj S-ro Lávička, por iliaj preparaj laboroj. — Por parte kompensi la elspezojn la kunveno decidis pagi al E. Klubo Pardubice subvencion de 250 Kč.

R. H.

*Vyžádejte si přihlášku a složenku
svazovou.*

u pokladníka O. Sklenčky, Hradec Králové. 628.

**ĈEĤOSLOVAKA GAZETARO
KAJ ESPERANTO.**

Signifon havas certe la fakto, ke ankaŭ ĉeĥoslovakoj vivantaj ekster sia patrujo estas aktivaj en la movado. Pruvas tion oftaj mencioj priesperantaj en la ĉeĥoslovaka gazetaro aperanta ekster la respubliko. Dum la lasta monato ni legis denove plurajn.

Pravda en Wien raportas ofte pri vigla laboro poresperanta de la grupo de katolikaj ĉeĥoslovakoj de Wien. La ebleco de tiu forta specialiĝo estas certe dokumento pri la enradiikiĝo de esperanto en nia nacio.

La longa artikolo „Esperanto antaŭe“ represita la 29. 5. 1931 en Spravedlnost (Chicago) estas ankaŭ en alia rilato instrua. Ĝi pruvas la pravecon de la konstato pri vortoj ŝajne internaciaj. La usona gazeto ĉeĥlingva uzas esprimojn, kies nesufiĉan internaciecon atestas la fakto, ke ili estas komprenataj en Ĉeĥoslovakio en senco alia. Anstataŭ „konvenco“, kio estas laŭ nia uzo „internacia traktato, kontrakto“, oni dirus „kongreso“ aŭ „sjezd“; la esprimon „university regent“ oni tradukus en ĉeĥoslovakian ĉeĥan lingvon verŝajne per „universitní posluchač“ (regent = ĉe ni „reganto“); „kredit“ signifas en la artikolo laŭ la usona lingvo „atestan noton“, dume ĉi tie la vorto estas uzata por „kredito“.

La artikolo „Voĉo de leganto pri esperanto, letero al kursgvidanto“ en Zájmy čsl. pošt a telegr. zřízenců (Praha), la 15. 6. 31. enhavas ne malbonajn, kvankam malfacile efektiviĝeblajn ideojn de Alois Bilek el Frýdlant nad Ostravicí.

„Kiel preĝas indianoj“ estas traduko el esperanto, de Ejš en Národní Politika (Praha), la 12. 6. 31.

„Instruistoj kaj esperanto“ de Julie Šupichová en Národní Politika la 23. 6. 31 kaj „Esperanto kaj niaj lernejoj“ en Škola měšťanská (Praha) la 24. 6. 31 estas longaj artikoloj alportantaj multe da detaloj pri tiu grava temo.

„Kristana Esperantista Ligo Internacia“ en Bratrstvo (Praha) la 10. 3. 31, informoj de T. Machala pri komencoj kaj nuna stato de la kristana movado esperantista.

La banloka revuo „Lázně Bělohrad“ la 1. 6. en saluta poemo „Al niaj gastoj“ aludas la esperantistojn tien venontajn al Internacia Libertempejo. Pri I. L. estas tie informa artikolo de Skl.

La nederlandan esperantiston Heinze akompanatan de Praha'aj esperantistoj montras bildo en Rozkvět (Praha) n-ro 27-1931.

Mladý socialista (Prahá) n-ro 1931: „El vivo de malliberulo“, trad. Vš el Sennaciulo.

Pri la Esperanto-Taĝo en Pardubice la 8. 6. 31 ni legis ĝis nun detale en Lidové Noviny (Brno) la 29. 6. 31, Nová Doba (Plzeň) la 1. 7., Východočeský Obzor (Pardubice) la 4. 7. 31. Antaŭe sciigojn alportis Lidové Listy (Prahá) la 20. 6. kaj Východočeský obzor la 25. 6. 31.

Jitro (Prahá) havas en n-ro 10-1931 Esperanto-fakon, kiu okupas preskaŭ plenan paĝon kun artikolo pri fondo de Studenta Sekcio ĉe Ĉ. A. E.

Obrana Lidu (Ml. Boleslav) la 10. 7. raportas pri la bele aranĝita esp.-fako farita de S-ro Pytloun kaj staranta en honora loko de la ekspozicio en Bakov.

Esperantan angulon de granda amplekso ni trovis la 14. 6. en Slovák — Bratislava.

Lidové Noviny (Brno) Informas la 9. 7. pri apero de la esperanta traduko de „Tridek jaroj en la ora nordo“ de Welzl. Por nia kunlaboranto estis interese kaj agrable trovi sub tiu redakcia artikoleto sian ĉifron „og“.

Informojn pri okazintaĵoj en Kiev laŭ esperanta raporto havas Rudé Právo 21. VIII. Por kontroli sciigon aperintan en alia gazeto, kunlaboranto de R. P. skribis al kieva esperantisto kaj publikigas tradukon de la veninta respondo.

Krome en plej diversaj gazetoj de nia respubliko amaso da artikoloj kaj artikoletoj pri la progresado de nia movado. O. G.

PLUA KOLEKTO EL NIA GAZETARO.

Kolektiĝis ĉe ni nova amaso de gazetoj, raportintaj pri la Krakova kongreso longe aŭ mallonge (aperloko Prahá, kie ne estas alia notita): Čech 4. VIII., 17. VIII.; České listy Mladá Boleslav 17. VII., 28. VIII., České slovo 2. VIII.; Českoslov. Republika 6. VIII.; Duch Casu Mor. Ostrava 25. VII.; Expres 25. VII.; Krakonoš Jičín 18. VII.; Letem světem (bildo) 18. VIII., Lidové listy 15. kaj 25. VII., 2., 11., kaj 14. VIII.; Lidové noviny 29. VII.; Národní Politika 5. VIII., 10. VIII.; Nová Doba Plzeň 19. VII.; Nový Večerník 6. VIII., Občanské listy Nymburk 25. VII.; Pravda Vídeň 9. VII., 8. VIII.; Právo Lidu 30. VIII.; Pražský Večerník 7. VIII.; Reforma 29. VII.; Rozkvět (bildo) nro 21-1931; Slovák Bratislava 1. VIII.; Stráž Třebíč 6., 20., 22. VIII.; Středočeská Obrana Pečky 17. VII.; Večerník Českého Slova 11. VIII.

Novaj gazetoj pri Internacia Libertempejo en Lázně Bělohrad: České listy Mladá Boleslav

17. VII.; Hlínské listy Hlínsko 18. VII.; Horácko Třebíč 11. VII.; Občanské listy Nymburk 25. VII.; Pisecké listy Písek 23. VII.

Slovák Bratislava 23. I. Nun venis en niajn manojn ampleksa artikolo kun titolo: „Idealo de estonta homo“. Laŭ ĝi tiu idealo estas, ke ĉiu krom sia lingvo sciu la latinan.

Ostravský deník (Mor. Ostrava) alportas pri la Mond-historio esperanta de Haefker informon kiu iris tra multaj gazetoj ĉeĥoslovakaj. Aldoniĝas estas malĝusta informo ĉerpita el nekonata fonto, ke la (jam antaŭe aperinta) verko aperos okaze de la Krakova kongreso.

Nový Večerník (Prahá) la 26. 5. priparolante la Napoleonan ekspozicion en Slavkov apud Brno diras al ni novaĵon, ke ĝin vizitis ankaŭ karavano de italaj esperantistoj. La ĉeĥoslovakaj esperantaj organizoj nenion aŭdis pri ĝi.

Nový Směr Mor. Ostrava en kvar nroj de 24. XII., 10., 17. kaj 31. I. 1931 alportas esperantlingvan artikoloserion de J. A. F. Vitek: Mia vojaĝo en Svedlando kaj Danlando.

Artikolon de Scherer „Pri hinda filmo“ en traduko de Ejš havas Národní Politika la 3. IX.

Slovenská Pravda, Košice respondas la 6. IX. en sia leterkesto al demandinto: „Ni ne rekomendas esperanton, ĉar ĝi estas elpensita lingvo menie parolata. — Jam pro la titolo (pravda = vero) utilus, ke la redakcio informiĝu, kio estas esperanto.“

Věstník ĉs. profesorů nroj 18-19 el 10. VI. enhavas artikolon pri la agado de la Esperantista sekcio de la Centra Asocio de ĉs. profesoroj.

En Prácheňské noviny Písek 19. VIII. ni vidis aliloke nelegitan tradukon el Headway, organo de la angla Asocio por Ligo de Nacioj. S-ro Newell Smith proponas tie al ĉiulandaj instruistoj kunlaboron por atingi de internacia paco. Tri vojoj li konsilas, kiuj kondukas al tiu celo: Helpon al la societoj por Ligo de Nacioj, lernadon de esperanto kaj studon de la vivo de ĉeĥoslovaka prezidento Masaryk.

Kredo je la intelekto, artikolo verkita por nia 1-a n-ro de ĈAE-prezidanto doktoro Kamaryt aperis en germana traduko en Westböhmische Tageszeitung Plzeň 22. VII. Ĝi estis ankaŭ represita en „Esperanto“ de UEA.

Kiu mondlingvo anstataŭos esperanton? demandas A-Zet Českého Slova 30. VII. en iom konfuza artikolo parolanta pri Ido, Volapük, kaj ĝeneva lingvista konferenco traktanta pri internacia lingvo.

Letero de Sacco, viktimo de usona justeco. Traduko el esperanto en Nová Doba Plzeň 22. VIII. O. G.

MOVADO EN ĈEHOSLOVAKIO

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA:

Generala kunveno okazis la 23. de januaro 1931. Estis elektita la jena komitato: Prezidanto s-ro Jaroslav Sustr, vicprezidanto s-ro Frant. Staněk, sekretario s-ro Vlast. Sedláček, kasistino s-ino R. Herzigová, membroj de la komitato finoj A. Tarantíková, I. Rabi kaj s-roj: Jar. Boháč, Rud. Hromada, Ant. Dvořák. Revizoroj s-ro Jar. Kleprlík kaj fino Růž. Kračhvilová.

20. II. 1931: **Tago de la libro.** Parolis s-ro dro Ĉ. Parma pri evoluo de esperanta literaturo, recitis f-ino A. Tarantíková.

27. II. **Parolado de s-ro profesoro Urban** pri lia vojaĝo tra Anglujo. Kun lumbildoj.

6. III. **Estona vesperc.** Malfermita per esperanta kaj estona himnoj, pri Estonujo parolis s-ro Fr. Staněk, pri estona folkloro kaj Kalevipoeg s-ro Sustr, el Kalevipoeg recitis s-ro F. Staněk. SIAJN REMEMOROJN el Estonujo rakontis s-ro Otto Ginz, pri esperantista movado en Estonujo raportis s-ro V. Sedláček. El estona poezio recitis f-ino Richterová, Tarantíková kaj s-ro Echtner. La vespero estis fermita per recitado de estonaj fabeloj de s-ro Sustr.

13. III. raportis s-ro O. Ginz pri la kultura filmo „Belega Danujo“ kun esperantaj titoloj kaj pri la esperanta gramofondisko.

10. IV. estis aranĝita **granda amuza vespero** kun muzika kaj gaja programo.

14. IV. okazis **eksterordinara komitata kunveno** kun ĉeesto de delegitoj el aliaj esperantistaj kluboj en Praha. Oni pridiskutis la aranĝon de vizito de s-ro J. Scherer el Praha dum novembro 1931.

17. IV. **Debato pri la liberaj proponoj el la ĝenerala kunveno.** Estis fondita amuza sekcio.

24. IV. paroladis S-o Sustr pri „Nihongó“ (Japana lingvo). Tio estis jam dua parolado pri simila temo. Dum la unua parolado temis pri la lingvo, vortsintakso kaj gramatiko, tiun ĉi fojon S-o Ŝ. paroladis ĉefe pri japanaj ideografioj, pri skribado, li prezentis eĉ unu poemon, kaj kelkajn rakontetojn (fabelojn) parte en originalo, kaj parte en sia propra traduko el japana lingvo.

1. V. debato pri Progreso, laŭ deziro de S-ro Hromada. La tre interesan debaton oni daŭrigos.

8. V. Vespero de popolaj fabeloj kun lumbil-

doj. Partoprenis F-ino Richterová, S-oj Echtner, Sedláček, Sustr, S-ro Echtner recitis baladon pri monto Blaník, publikigitan en la Progreso No 3.

15. V. 1931 Lektoro de Esperanto Dro Aug. Pitlík paroladis pri instruaj metodoj de esperanto, kaj komparis ambaŭ famajn metodojn: Privat (Linguaphone) kaj Ĉe. Dum sia parolado li faris eksperimenton de ambaŭ metodoj.

29. V. 1931. S-ro Staněk kaj faris prelegon pri statistiko de vivaj lingvoj kaj ĝia rilato al Esperanto. La programon pliriĉigis persiaj raportoj jenaj ĝes-roj: O. Ginz (organizaĵaj kaj gazetaj novaĵoj), R. Herzigová (ekskursoj) kaj s-ro Sedláček (pri esperanta movado). La raportoj estis atente aŭskultataj de 38 personoj kaj 4 gastoj.

5. VI. 1931 vicprezidanto de la klubo prezentis sin kiel viva gazeto, kaj legis diversajn „raportojn“ el gazeto nekonata. Li kritikis, moketis, laŭdis kaj riproĉis, raportis kaj anoncitis. Klubanoj tre bone amuzis, la enhavo rilatis ilin mem!

12. VI. 1931 Multnombre vizitatan kunvenon vizitis gasto, s-o Ph. N. Heinze el Ultrefit, kiu post transdono de salutoj de nederlandaj esperantistoj, paroladis pri sia patrujo, kaj precipe pri giganta sekigado de suda maro. S-o Heinze ne estis la unuan fojon en Praha, kaj ke al li plaĉas ĉe ni, dokumentas liaj vortoj dum la adiaŭo, ke li esperas, ke li ne estas lastan fojon en Praha, S-o Heinze vizitis pli multajn lokojn en nia respubliko.

19. VI. kaj 26. V. okazis viglegaj debatoj pri okazonta Esperanto-Tago en Pardubice. Rezulto de tiuj interesaj debatoj estis, ke la Klubo estis en Pardubice reprezentata per plej granda nombro de ĉeestantoj.

3. VII. 1931 prezidanto de la Klubo raportis pri Esperanto-Tago en Pardubice. Ĉeestanta Sveda samideano s-o Andersen, parolis pri la movado en Svedujo.

17. VII. 1931 Edmond Zscheile, esperantisto, kiu helpo de esperanto tramigris ĉiujn mondpartojn, parolis tre interese pri diversaj siaj impresoj kaj travivaĵoj en la mondo.

24. VII. 1931 vizitis la Klubon plej populara esperantisto de la mondo, s-o J. Scherer, kiu uzis la okazon por fari mallongan montraĵon de siaj interesaj paroladoj kaj ravaj lumbildoj. Nur nevolonte je la noktomezo disiris la kunvenintaro, kiu estus aŭskultanta s-on Scherer ĝis la mateno. Alia gasto, kiu la saman tagon ĉeestis la kunvenon estis direktoro de UEA, s-o H. Jakob. Antaŭ ol s-o Scherer ekparolis oni aŭskultis mallongan sed interesan

parolon de s-o Jakob, kiu i. a. nove instigis esperantistojn de Praha, ree inviti unu el la venontaj kongresoj al Praha.

21. VIII. Okazis parolado de Dro Aug. Pitlík pri la XXIIIa Unversala Kongreso de Esperanto en Krakovo. La kunvenon vizitis D-ro Domec el Indociĉio.

28. VIII. Diversaj raportoj de sroj Bloch (pri kongreso en Krakovo) kaj Sustr, pri internaj aferoj, kursoj, k. s. s-o Louda pri lia artikolo en Oomoto.

4. IX. Miksita programo. Recitado de fino Tarantíková, s-o Fr. Staněk, raportoj de sroj Ginz, Bloch, Sustr. La lasta fine de la kunveno amuzis ĉeestantojn per kelkaj „sorĉoj“, kiujn li faris helpe de ludkartoj.

11. IX. Sen ia speciala atentigo kaj preparo, okazis kunveno, kiu estis plena da ĝojo kaj esperanta entuziasmo:

Oni trovis la plej valoran maloftaĵon de la kluba arkivo, kiu perdiĝis dum la mondmilito. Estas letereĝo, tre ampleksa, tri metrojn longa, 17 foje faldita, kiu tramigris dum la jaroj 1905—1906 la tutan terglobon, vizitis 25 ŝtatojn kaj revenis Prahon post 21 monata migrado. Tiu ĉi tre interesa kaj bela dokumento pri disvastigo de Esperanto malaperis iam dum la mondmilito. Kiam nunjare prezidantiĝis la nuna klubestro s-o Sustr, li decidis serĉi tiun ĉi interesan leteron, kaj sekvi ĉiujn ĝiajn postsignojn por sciigi, kie ĝi malaperis. La laboro ne estis facila. Ĉiu sciis kon alian. Dume iuj opiniis, ke la letero estas konservata en Praha ĉe iu eksfunkciulo, aliaj opiniis scii, ke la letero perdiĝis, ke ĝi detruigis, ktp. Rezulto de kelkmonata esplorado estis, ke ununura homo, povus alporti iom da lumo en tiun ĉi enigmon. Tiu homo estis unu el fondintoj de la klubo, s-o E. Kühnl. S-o Bloch atentigita de la klubestro, esploris la aferon, kaj la rezulto estis, ke s-o Kühnl post longa serĉado, trovis tiun leteron inter siaj paperaĵoj kaj redonis ĝin al la klubo, kune kun aliaj tre valoraj dokumentoj esperantaj, kiujn li al Klubo donacis. Kiam s-o Bloch informis la kunvenon pri tio, ekregis granda ĝojo inter ĉiuj klubanoj kaj multaj amasiĝis ĉirkaŭ la dokumento.

Eksterlandaj gastoj en Praha 1931.

Tre ofte okazas, ke venas en la Klubon gastoj el eksterlando. Plej multaj venas dum somero. Tia dumsomera kunveno de Esperantista Klubo en Praha ofte similas malgrandan kongreson. Kaj dum la provincaj kluboj eĉ ne kunvenas, klubo en Praha havas plej multe da la-

boro. En la ĵus pasinta somera sezono vizitis la Klubon esperantistoj el jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Britlando, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Indociĉio, Java insulo, Latvio, Nederlando, Polujo, Svislando, Svedujo, Usono. Kompreneble, ke ne ĉiu eksterlanda esperantisto vizitinta Prahon havis okazon veni en la Klubon. Oni renkontis en Praha esperantistojn ankaŭ el Danujo, Bulgarujo, Jugoslavio, Japanujo, Alĝerio k. a. S.

Olomouc. La 24. 4. okazinta ĝenerala kunveno de Esp. soc. elektis jenan estraron: pr. Kudela, v. p. Neužil, s. Pittner, Mrázková, kas. Stěrba, alsid. Mastný, Golla. El Prostějov ĉeestis s-roj Heikenwälder, prof. Havránek, Jeřábek. Nova tre interesa libro „Tridek jaroj en ora nordo“ kiun eldonas Mor. Esp. Pion. estas en presado. (Jam aperis.)

Kurso por ŝoferoj estis aranĝita en Česká Lípa de la loka grupo de la Internacia ŝofera unuigo. Kurso komencis 7. III. 1931, gvidis ĝin s-ro A. Schlesinger kaj partoprenis 10 ŝoferoj.

Bor. La loka Urba ŝparkaso dediĉis al uzo de someraj gastoj apartan oficejon, en kiu ĝi disponigas al ili ankaŭ turismajn prospektojn diverslingvaj. Tiun ĉi jaron ĝi envicigis inter tiujn prospektojn ankaŭ prospektojn esperantlingvaj. Oni petas la eldonintojn sendigi kernajn presaĵojn laŭ adreso: Fr. Böhm en Bor, Talstr.

Mladá Boleslav. — La 8. 9. fondiĝis Klubo de esp-istoj. Prez.: red. Reichelt. Sekr.: Malina Quido, stud., Starofarní, 73. Kunvenoj ĉiumarde, 20 horo (ejo?).

Bratislava. Esperanto-Klubo evoluas vigan agadon. La 19. 9. Dro Kamaryt kaj J. Klapáta parolis pri siaj impresoj el Krakovo kaj Bělohrad. — La 20. 9., dimanĉe, ekskurso al Pezinok kaj Limbach. Kunveno kun samideanoj de tie kaj de Trnava. — La 29. 9. parolis en la klubo prof. Giralt el Gerona. — Parolado de J. Scherer okazos la 23. 11. — Publika kurso deponit 6. 10.

Komerca Akademio en Bratislava. Samideano Vlad. Jukl, profesoro de tiu ĉi lernejo aranĝis ekspozicion por la lernantoj, faris varbajn alparolojn kaj komencis la 14. 9. nedevigan instruadon por 15 lernantoj, inter ili 4 estas el la I. klaso. Instruado okazas laŭ lernolibro de Šilha.

Komerca Akademio en Olomouc. S-ro Ne-
užil gvidas tie kurson por 40 lernantoj.

Komerca Akademio en Hradec Králové. Profe-
soro de tiu lernejo S-ro Fr. Smeták instruas
tie esperanton al 15 lernantoj, laŭ lernolibro
de Šilha.

Olomouc. Kurso por 20 p. estis malfermita
en Horka ap. Olomouc. Alia kurso, same por
20 p., okazas en malnova reallernejo. Ambaŭ
publikajn kursojn gvidas S-ro Neužil, di-
rektoro de popollernejo. — La Esp. Societo
disdonis 1500 flugfoliojn propagandajn. — Plie,
esperanton lernas preskaŭ 60 infanoj en la
lernejo de S-ro Neužil. Kiel videble la sami-
deanoj de la urbo de la venonta ĉeĥoslovaka
kongreso esperantista faras sian eblon.

Kolín. Esp. Klubo preparas publikan kurson.

Frydek-Místek. La loka grupo anoncas en
lokaj gazetoj aranĝon de la kurso.

**Aĝrabla surprizo en la landa terkultura ekspo-
zicio en Olomouc (5. 9.—13. 9. 1931).** — En
la „abelbredista angulo“ de la terkul-
tura ekspozicio troviĝis kelkaj folioj da kolora
papero kun alfiksitaj ilustritaj kartoj, prezen-
tantaj ĉefe abelulojn kaj ĝiajn posedantojn,
el multaj landoj. La menciitajn i. p. akiris sa-
mideano J. Navrátil en Kovalovice pere de espo.
Ni dankas al li, ke li celis tiamaniere efike pro-
pagandi esperanton. — Pli arta kaj lerta aranĝo
de la bildoj kaj precipe de la surskriboj estus
tamen dezirinda. -?-

Esp. prediko en Praha.

Dimanĉe la 20. 9. 1931 je la 10 horo matene
okazis en preĝejo de Sta Ursulo, sur ĉefa stra-
to (Národní), esperanta prediko de kataluna
pastro, prof. J. Font Giral el Gerona. Dum la
diservo estis kantata „Dio antaŭ via majes-
teco“ en traduko de D-ro Parma.

Publika esp. parolado en Praha. Pri Hispanio.

Lunde la 21. Septembro 1931 je la 20. h. en
salono de Merkur (Praha V., Pařížská), S-ro
prof. J. F. Giral parolis pri la nuna situacio
en Hispanio, pri ĝia antaŭhistorio kaj pri la ŝan-
coj de la katolikismo. La parolado ŝajnis al mi
tre objektiva, klara kaj instrua. La oratoraj
kvalitoj de P. Giral kontentigis ĉiujn. La vespe-

ro estis aranĝita de la katolikaj esp-istoj en
Praha, en la ĉefan lingvon tradukis S-ro Fi-
lip. La katolikaj samideanoj povas esti konten-
taj: per la prediko, per tiu ĉi parolado kaj
per la radio-parolado ili bone eluzis propagan-
de la viziton de sia gasto. Hmd.

Esperanta radio-parolado en Praha.

Marde la 22. 9. 1931 post la 19-a horo Prof.
J. Font-Giral el Gerona (Hispanio) havis 20
minutan paroladon el la radio-stacio Praha pri
siaj impresoj el Ĉeĥoslovakio. Liaj entuzias-
maj vortoj pri Praha, Kutná Hora, Karlův Týn
k. a. certe aĝrable tuŝis ĉiujn aŭskultantajn
samideanojn.

Esperanto-gazetoj en Ĉeĥoslovakio. La listo
donita sur p. 83. de nia pasinta jarkolekto
estas jam kompletigota per nova titolo: „Li-
gilo, monata organo de la Juda Esperantista
Grupo en Bratislava.“ Komencis ciklostilite a-
peradi en januaro 1931, kvarpaĝa sub „Ĉef-
redaktoro“ Armin Roth, Jarabono 10 Kĉ. Ad-
reso: Turnerstrato 3-a. Estas nia devo esprimi
miron, ke samideanoj, Intencantaj informi ce-
terajn samideanojn pri la movado, estas mem
tiom malmulte informitaj, ke ili ne scias, pri
gazeto aperanta kun la sama nomo en nia lando
en urbo ne tro malproksima de la ilia. S. K.

TURISMO.

Ni legas en Ĉasopis turistů (Gazeto de turis-
toj) volumo XLI, nro 2 el februaro 1929 sur
paĝo 58. en raporto pri ĝenerala kunveno de la
regiono (župa) de la Slovaka Karsto inter „Li-
beraj proponoj“ jenon: „Delegito el Dobsina
s-ro Šnopl raportas pri la Esperantista organiza-
jo en Genève kaj li rekomendas, ke la grupoj
aliĝu al ĝi, ĉar ĝi entreprenas celtrafan pro-
pagandon en la tuta mondo. Aliĝojn akcep-
tas s-ro O. Skleněka, oficisto de la Živnoban-
ka en Hradec Králové. La membra kotizo estas
50 Kĉ por jaro. Tiu ĉi reklamo estas tre bona
kaj malkara.“ Ni aldonu, ke la turista gazeto,
kiun ni citas, estas eldonata en 45.000 ekzem-
pleroj. Kaj ni aldonu plue rekomendon imiti.
Pro tiu ĉi kaŭzo tiu ĉi informo ankaŭ nun estas
aktuala.



Slovník obchodně-technický, účetní a daňový.
Sešit čís. 1 — 3 (V dílu) obsahuje: Chartepartie, charter —
Chemický průmysl - Chemické výrobky - Chirurgické nástroje
- Chladírny - Chléb - Chmel - Chronologické zápisy (jednodu-
ché účetnictví - kamerální účetnictví - mechanisace - podvojně
účetnictví - sporitelny a záložny) - Chudinství - Chyby v účet-
nictví. Vydávají Tiskové podniky Ú. S. Č. P., Praha I., Masary-
kovo náměstí 4. Cena sešitu Kč 19-50.

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA

Red. O. Ginz.

Lékařský slovník esperantský, výsledek mnohaleté práce vynikajících odborníků, jest hotov a vyjde v krátké době. Redakce esperantského časopisu lékařského Internacia Medicina Revuo (Bruxelles, 20, rue aux Laines) vypisuje výhodnou subskripci.

Esperanto proniká do praktických povolání. Krakovská střední škola pro státní úředníky zavedla esperanto jakožto povinný předmět vyučovací. Vyučováni se bude pouze jednu hodinu týdně po celý rok, což postačí k úplnému ovládnutí jazyka. Zajímavé bylo by srovnání s jinými jazyky, kdy po námaze nesrovnale větší jsou výsledky prabídné.

Esperanto prostředkem k upevnění vzájemné důvěry. Světová krise byla s počátku považována za krizi hospodářskou, pak za krizi finanční. Dnes se světová politika shoduje v názoru, že jde o krizi důvěry. O nedostatek důvěry mezinárodní a o nedostatek důvěry ve vlastní schopnosti. Velmi opatrné styky mezinárodní a zvýšený počet sebevražd jest toho dokladem. Tento názor vyjádřil v Ženevě předseda Společnosti národů Titulescu a předseda rady Společnosti národů Lerroux. Jako lék proti této všeobecné nedůvěře byl v poslední konferenci britské universitní Lígy podán návrh, aby do všech škol bylo zavedeno studium esperanta jako činitele, který sblízuje národy a poskytuje jejich stykům pevný základ vzájemné důvěry. K upevnění sebedůvěry doporučuje studovati život Masarykův, tak bohatý na boje a zklamání všeho druhu. A přece bylo jeho životní dílo korunováno skvělým úspěchem.

Užití esperanta v tělesné výchově. Švédská společnost pro fysickou výchovu „Gymn“ v Stockholmu zřizuje mezinárodní tělocviční kurs, jehož jediným jazykem pro dorozumívání a pro povely bude esperanto.

Bulharský esperantista oloupen v Číně. Bulharský profesor Iljev cestovavší se svou dcerou v Dálném východu, byl přepaden v čínském vnitrozemí lupiči a obrán o všechna zavazadla. Profesor Iljev byl hostem čínské organizace esperantské, odbočení s jeho ustanovené cesty se mu stalo osudným. Kantonský časopis esperantský podává o tom zprávu a vyslovuje politování nad událostí zaviněnou nyní nejším stavem Čínské republiky.

Vědecká díla v esperantu. Meteorologický a geodynamický ústav v Lublani vydal esperantsky sepsanou zprávu o svých meteorologických pozorováních, konaných v letech 1923 a 1924. V tom oboru následuje jihoslovanský ústav příkladu Japonska, kde státní meteorologická observatoř v Tatenu vydává pravidelně esperantské zprávy o své činnosti. Společný mezinárodní jazyk se stává důležitým pomocníkem ve vědecké práci.

Francouzské obchodní komory se vyslovují pro esperanto. Při sjezdu francouzských obchodních komor prohlásil Baudet, předseda komory pařížské, že důležitým předpokladem pro vzrůst mezinárodního obchodu Francie jest široké užití esperanta na tomto poli. Obchodním komorám francouzským doporučil, aby se zabývaly touto otázkou.

Esperanto ve službách rakouské turistiky. -- Spolkové dráhy rakouské povolily svým zaměstnancům, ovládajícím esperanto, aby nosili ve službě příslušný odznak a upozornili tak na sebe zahraniční turisty, potřebující informace; bylo vydáno též několik vkusných průvodců Rakouskem, sepsaných v esperantu.

Esperanto pro holandský obchodní dorost. Holandský ministr vyučování nařídil výnosem z 1. září nepovinné vyučování esperanta na obchodních školách této země.

Esperantský film o Japonsku. Japonské ministerstvo železnic zve k návštěvě své země nádherným přírodním filmem, nazvaným „Čtyři roční počasí v Japonsku“, jenž nastoupí letos cestu světem. Praktičtí Japonci opatřili film, určený pro celou Evropu, tituly jednojazyčnými, a to esperantskými. Po velkém úspěchu státního esperantského filmu o Dánsku se domnívají právem, že rozluštili správně nesnadnou jazykovou otázku ve filmu.

Esperantská nadace při liverpoolské universitě. Rektorát university v Liverpoolu uveřejnil podrobnosti o nově zřízené nadaci Johna Buchanana pro esperantské vědecké práce. Každého roku budou udělovány tři ceny po 25 angl. líbrách (přes 4000 Kč), o něž se mohou ucházeti studenti kterékoliv university Velké Británie. Pro rok 1931-32. byla vyspána tato témata: Pojednání o problému mezinárodního slohu a překlad určitého odstavce z díla Arnolda Benetta.

Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINAŘ NYMBURK.